# La Espero

SVENSKA ESPERANTOTIDNINGEN

SPECIALA NUMERO 1979
67-A JARKOLEKTO

8

ISSN 0014-0694
FONDITA EN 1913


## 1889—1979

# *Naŭdek jaroj de esperanto en Svedio*



**La Espero**

Organ för Svenska Esperantoförbundet
*Adress:* Box 4009, 122 04 Stockholm-Enskede
*Ansvarig utgivare:* Bertil Åkerberg
*Redaktör:* Franko Luin, Myggdalsvägen 123, 135 42 Tyresö
*Telefon hem:* 08 - 712 82 91
*I redaktionen:* Sven Alexandersson, Åke Blomberg, Anita Lindblom
*Prenumeration:* 40 kronor per år, postgiro 20 12 - 3, Esperantoförbundet
Tidningen utkommer med 8 nummer per år: i februari, mars, april, juni, september, oktober, november och december
*Manusstopp:* den 10, månaden före utgivningsmånaden
*Fotosats:* Esperantoförbundet
*Tryck:* Sturetryckeriet AB, Stockholm 1979

**Esperantoförbundet**

*Postadress:* Box 4009, 122 04 Stockholm-Enskede
*Besöksadress:* Hägervägen 31 (T-station Tallkrogen)
*Telefon:* 08 - 48 99 76
Förbundets expedition har öppet tisdagar kl. 18 — 20
*Postgiro:* 20 12 - 3
*Medlemsavgift:* direktansluten medlem 50 kronor, ungdomsmedlem under 26 år 25 kronor, familjemedlem (utan tidning) 15 kronor
Prenumerationsavgift för *La Espero* och *Esperantonytt* ingår i medlemsavgiften.
Medlemmar under 30 år får dessutom ungdomsförbundet SEJUs blad *ktp.*

**Esperantoförlaget**

*Postadress:* Fack, 20042 Malmö
*Besöksadress:* Möllevångsgatan 20 B
*Öppettider:* 1 sept — 15 maj: onsdagar kl. 10 — 11, torsdagar kl. 17 — 18
Skriftliga beställningar expedieras hela året, även under sommaren
*Telefon:* 040 - 12 20 29
*Postgiro:* 578 - 5
*Expedition:* Anna-Greta Strönne
*Medhjälpare:* Wivi Nilsson
*Styrelsens ordförande:* Åke Blomberg

# De *Internationelt språk* ĝis *Aniaro*

Antaŭ naŭdek jaroj, en 1889, aperis la unua libro pri esperanto en la sveda lingvo. Temis pri traduko de *Lingvo Internacia* de L. L. Zamenhof. Nur du jaroj pasis post la apero de *la* unua libro, kaj jam la svedoj povis konatiĝi kun la verko de Zamenhof. Rapide radikiĝis la ideo pri komuna internacia lingvo kaj tre frue Svedio ludis internacie gravan rolon en la tiam delikata kaj malforta esperanto-movado.

La jena speciala numero de *La Espero* estas kroniko pri la naŭdek jaroj, kiuj pasis de post tiu unua kajero. Temas pri jaroj fruktodonaj kaj jaroj, kiam la agado vere ne estis rimarkebla. Ne temas pri la tuta agado; por pludoni tian, la numero devus havi dekoble pli da paĝoj ol ĝi havas. Ne, temas nur pri elekto de kelkaj tipaj, gravaj aŭ nur kuriozaj eventoj el tiu riĉa historio, kiu apartenas al la sveda esperanto-movado. Multo mankas. La redaktoro konscias, ke la agado de la junularo kaj de la du aliaj fortaj movadoj troviĝantaj en Svedio, la kristana kaj la laboristesperantista, apenaŭ estas tuŝataj; kaj tio estas vere grava manko. Aliflanke, kelkaj okazaĵoj ne estas forgesitaj, sed ellasitaj pro neceso. Temas pri speciale enhavoriĉaj jaroj, kiam la selektotondilo devis esti speciale severa. Se vi trovas, ke en unu jaro aperis du libroj, tio povas signifi, ke aperis tiuj du libroj, sed ankaŭ, ke tiuj du estas la plej interesaj el eble deko da aliaj.

Ankoraŭ vorto pri la materialo, el kiu mi ĉerpis por tiu ĉi kroniko. Pri la jaroj ĝis 1930 tre utilis la *Jubilea Matrikulo de SEF* por la jaro 1931 kaj la libro *50 jarojn kun Paul Nylén.* Pri la tempo post 1930 mi sekvis manuskripton, vere tre riĉan, de Jan Strönne; sed ne lin vi kulpigu pri eventualaj ellasoj, sed min.

En 1889 aperis *Internationelt språk*. En 1979, naŭdek jarojn pli poste, aperis *Aniaro*. Inter tiuj du libroj troviĝas la historio de la sveda esperanto-movado. Samtempe tiuj du libroj estas monumentoj pri la evoluo kaj la kresko de la tuta esperantomovado: de lingvo kaj ideo simplaj, sed allogaj, al lingvo kaj ideo enhave kaj forme riĉaj.

**Franko Luin**

## *Naŭdek jaroj de esperanto en Svedio*


Dr ESPERANTO.
INTERNATIONELT SPRÅK.
FÖRETAL OCH FULLSTÄNDIG LÄROBOK.
(por Svedoj.)
Öfversättningen verkställd af G. Henriclundquist
WARSCHAU.
L. Samenhof, Franjoski-Str. N. 9.
1889.

**1889** Aperas la unua sveda lernolibro de esperanto: *Dr Esperanto. Internationelt språk. Företal och fullständig lärobok (por svedoj.* Tradukis G. Henriclundquist, eldonis L.L. Samenhof.

**1890** Aperas la unua sveda lernilo, verkita de A.F. Runstedt, studento en Uppsala. Claes Adensköld komponas la unuan melodion de *La Espero*.

**1891** Fondiĝas Klubo Esperantista en Uppsala, unua en Svedio kaj dua en la mondo.

**1892** G.H. Backman el Helsingborg eldonas lernolibron de esperanto. Paul Nylén fariĝas esperantisto.

**1893** P. Nylén aniĝas en Klubo Esperantista de Uppsala. Verda koloro kaj verda stelo simboloj de esperanto.

**1894** Voĉdono pri reformoj de esperanto. Malakcepto: 157 voĉoj kontraŭ, 107 por (el ili nur 11 plene).

# Naŭdek jaroj de esperanto en Svedio

**1895** Post malpermeso kaj malapero de *La Esperantisto* aperas en Uppsala *Lingvo Internacia*. Paul Nylén kunlaboranto.

**1896** Aperas nova sveda lernolibro, verkita de Nylén: *Lärobok med exempel och öfningar.*

**1897** Paul Nylén fariĝas redaktoro de *Lingvo Internacia.* Fondiĝas «Kapitalo de dro Zamenhof», per kiu estas financata eldonado de propagandaj broŝuroj pri esperanto en diversaj naciaj lingvoj. Prizorgas Nylén.

**1898** Fondiĝas Klubo Esperantista en Stockholm. Prezidanto Filip Langlet, sekretario Per Ahlberg.

**1899** Aperas la dua, pligrandigita, eldono de vortaro de Nylén, kies unua eldono aperis en 1897.

**1900** Ĉe Societo por Internaciaj Studoj suksesa esperanto-vespero. Partoprenis Krikortz, Roswall kaj V. Langlet.

**1901** Esperanto-kolono en *Södertelge Tidning* ĉiun semajnon. Verkas J.J. Süssmuth. La estraro de Sveda turista asocio akceptas uzadon de esperanto. Harald Thilander komencas informi pri esperanto al blinduloj.

**1902** ĝis 1905: malmulto okazas. *Lingvo Internacia* translokiĝis al Hungario en 1901 kaj Nylén al Stockholm samjare.

**1904** En porblindula instituto en Tomteboda kurso pri esperanto. Gvidas V. Langlet.

**1905** Unua esperantokogreso en Boulogne-sur-Mer. Pluraj svedoj partoprenas. Kvar svedoj elektitaj en lingvan komitaton: Ahlberg, Krikortz, Nylén kaj Cederblad.


Vikt: 5 gram. Pris: 5 öre.

Nyckel till Esperanto.

**1906** Aperas la unua *ŝlosilo* por svedoj. Aperas *Esperantisten*, eldonata de la stokholma klubo; redaktoro P. Ahlberg. Fondiĝas Svenska Esperanto-förbundet — Sveda Esperantista Societo (poste Sveda Esperanto-Federacio). Prezidanto Vald. Langlet, fondinto kaj multjara prezidanto de la klubo de Uppsala, sekretario P. Ahlberg, vicprezidanto S. Krikortz, kasisto E. Olsson.

**1907** La 20-jara jubileo de esperanto festata en Skansen de 50 personoj. Unuafoje flirtis la esperantoflago en Stockholm. La popolaltlernejo de Brunnsvik enkondukas esperanton.

**1908** La «plibonigita» esperanto, ido, minacas detrui la svedan esperantomovadon. La gazeto *Esperantisten* fine de la jaro fariĝas idista. Sveda Esperanto-Teatro ludas du teatraĵojn de Strindberg dum la UK en Dresden: *Pario* kaj *Fraŭlino Julie.*

**1909** Daŭras la batalado inter esperanto kaj ido. La jarkunveno de SEF decidiĝas definitive pri esperanto. *Dana esperantisto* provizore organo de SEF. Decido pri reorganizo de SEF.

**1910** SEF nomiĝas nun oficiale «Federacio». Nova gazeto *Sveda Esperantisto* de John Lundgren dum unu jaro organo de SEF.

**1911** En Helsingborg aperas *Esperanto-Folket* de G. H. Backman. Carl Lindhagen levas la demandon pri internacia lingvo en la sveda parlamento por la unua fojo.

**1912** D.E. Parrish, sendito de la komerca ĉambro de Los Angeles vizitas Svedion kaj prelegas. Centoj da aŭskultantoj en ĉiu loko

**1913** Aperas en Gävle *La Espero,* per kio solviĝas la demando de longdaŭra organo por la esperantomovado en Svedio.

**1914** «Baltaj esperantistaj tagoj» en Malmö. Koresponda kurso en *Såningsmannen.*

## Naŭdek jaroj de esperanto en Svedio

**1915** SEF jarkunsidas en Norrköping. Sven Jerring ludas en teatraĵeto. John Lundgren redaktoro de *La Espero*.

**1916** «La blanka generalo», la konata pacifisto A. Wickman, faras propagandan vojaĝon por esperanto tra la lando.




**1917** Zamenhof mortas. Multaj artikoloj pri li kaj esperanto. La 30-jara datreveno de esperanto festata.

**1918** Unua Skandinava Kongreso de Esperanto en Gotenburgo. *La Espero* ricevas novan redaktoron: Paul Nylén. Fondiĝas «Eldona Societo Esperanto».

**1919** Fondiĝas «mondlingva komisiono», kiu sendas memorandon al la Ligo de Nacioj, ke ĝi nepre esploru la problemon de internacia lingvo.

**1920** Reĝo Gustavo V-a akceptis en aŭdienco la prezidanton de SEF, Paul Nylén, kiu ankaŭ vizitas la ministron pri instruado cele al provinstruado dum 1922.

**1921** Karavana vojaĝo al la kongreso en Prago. Nylén elektita honora prezidanto de SEF. Nova redaktoro de *La Espero*: Henning Halldor. Fondiĝas SLEA.

**1922** Esperanto enkondukita en la Beskowa lernejo. Fondiĝas Sveda Esperanto-Instituto. Postkongresa vizito en Stockholm (la UK estis en Helsinki).

**1923** La kongreso de SEF en Stockholm decidas, ke la honora prezidanto Paul Nylén funkciu kiel afergvidanto.

**1924** Nylén ankaŭ fakte elektita prezidanto de SEF dum jarkunsido en Stockholm. Sed novaj gvidantoj proksimiĝas al la gvidaj postenoj: Malmgren, B. Eriksson, G. Johansson, V. Bonde, E. Carlén.

**1925** En jarkunsido en Ludvika decidas krei propagandan fondaĵon per monkolektaj kartoj. Komenciĝas la senpaga koresponda kurso de SEF: 4000 mendoj ĉiujare. Aperas «Praktika lernolibro de esperanto» de S. O. Jansson.

**1926** SEF jarkunvenas en Örebro kaj festas sian 20-jaran jubileon.

**1927** Dro Edmond Privat vizitas Stockholm por partopreni internacian kongreson de kooperativoj. Radio-diskuto, partoprenas urbestro Lindhagen, prof. Zachrisson, raktoro Jansson kaj lektoro Bergman. Andreo Ĉe alvenas al Svedio, vokita de SEF por propagandi.

**1928** La jarkongreso de la sveda socialdemokrata partio akceptis proponon apogi enkondukon de esperanto en la lernejojn. SAT-kongreso en Gotenburgo. Tiberio Morariu alvenas al Svedio kaj komencas siajn amasajn paroladojn kaj kursojn.

**1929** La sveda parlamento asignas 2 900 kr por instruistaj kursoj pri esperanto. Selma Lagerlöf konsentas kun SEF pri eldonrajtoj de ĉiuj ŝiaj verkoj en esperanto. Somera interŝanĝo de esperantistaj infanoj inter Svedio kaj Estonio.

**1930** Interbalta Esperanto-Kongreso en Stockholm; aranĝo de Esperanta Turista Komisiono. Radioprogramo unufoje monate. Aperas «Per balono al la poluso» pri Andrée.

**1931** SEF jubileas: 25 jaroj. Eldono de *Jubilea matrikulo*. Kursoj kaj prelegoj tra tuta Svedio de Morariu, Seppik, E. Pähn, Burgmeister, Ruus. Du kursoj por instruistoj. Libervola kurso en Viskadalen.

**1932** SEF kongresas en Eskilstuna. Daŭriĝas la kursoj por instruistoj. Prelegoj kaj kursoj de Morariu, Forge, Pähn, Paseka, Czitrom, Steiner, Fox, Hurler, Rois, Ruus, Lidja Zamenhof.

ETK-vojaĝoj al Parizo, Estonio, Pollando. Aperas «Tra sovaĝa Kamĉatko».

**1933** Dekkvino da prelegantoj kaj kursgvidantoj en la lando. Esperanto inter la plej amasaj kursoj ĉe ABF. SAT kongresas en Stockholm. Grupvojaĝo al UK Kolonjo. Honormedalo de la Internacia Centra Komitato al Nylén. Aperas dek du diversaj eldonaĵoj, inter ili du tradukaĵoj de S. Lagerlöf. Preparoj por la UK Stockholm en 1934.

**1936** Th. Thordarson, L. Sinha, E. Pähn kaj J. Scherer rondvojaĝas kaj prelegas; Morariu, Szilágyi, Haudebine kaj alinger gvidas kursojn. Komenciĝas la kursoj en Helsingør. SEF eksiĝas el UEA kaj aliĝas al IEL. Sveda Internacia Gazetejo sendas ĉiun semajnon novaĵojn pri esperanto al la tuta mondo.



*La estraro de SEF kunvenas en 1935. Plej maldekstre estas videbla Ernfrid Malmgren, apud li kun la lipharegoj estas Paul Nylén.*

**1934** Daŭras la amasaj kursoj kaj prelegoj. UK Stockholm: 2000 partoprenantoj. Antaŭkongreso en Malmö. *Dagens Nyheter* ĉiutage dum UK kun paĝo da esperantaj novaĵoj. Aperas «Sveda Esperanto-vortaro», unua parto, «Gösta Berling», «Sveda Antologio», unua parto, «Al Torento» de Engholm.

**1935** SEF kongresas en Gotenburgo. Publikigo de trijara laborplano. *La Espero* en pli granda formato. Ĉiun dimanĉon radioprogramo el Uppsala. Aperas duaj partoj de «Sveda Antologio» kaj «Sveda Esperanto-vortaro», plus sep aliaj libroj.

**1937** Pli da prelegvojaĝoj, i a de Julio Baghy. ETK-vojaĝoj al Parizo kaj Estonio. Grupvojaĝo al la jubilea Varsovia UK. SEF translokiĝas al Tegelbacken. Jubilea festo en Stockholm.

**1938** Kvin eksterlandanoj prelegvojaĝas. Eva Julin nova redaktoro de *La Espero* (post B. Eriksson, kiu ekagas anstataŭe en Eldona). Unua dan-sveda esperantotago en Lund; 350 partoprenantoj. Radiodisaŭdigoj ĉiudimanĉe el Malmö. Aperas «la ringo de la generalo». kaj «Per motorciklo en tri landoj» de G. Henriksson.

**1939** Kursoj kaj prelegoj de eksterlandanoj daŭriĝas (i a R. Dupuis). Somera kurso en Viggbyholm. Grupvojaĝo al UK Berno. Mortas rektoro Sam Jansson. Karl Söderberg nova gvidanto de Sveda Esperanto-Instituto. Garantia subskribado por vojaĝsekretario de SEF. Aperas dua parto de «Infanoj en Torento».

**1940** Sentiĝas jam la milita tempo; nur unu prelegvojaĝo (Szilagyi). SEF kongresas en Stockholm. Kunveno pri kunlaboro inter la Nordiaj landoj. Decido pri vojaĝsekretario. Ekzamenaj insignoj de la Instituto.

**1941** SEF kongresas en Uppsala. Morariu dungita vojaĝsekretario, danke al Fejde; li tuj eklaboras kaj vizitas la klubojn. La klubo de Malmö jubileas, i a per meto de florkrono sur la tombon de Hermod. Nova estro de Eldona Bernhard Eriksson.

**1942** Plena programo por la vojaĝsekretario Morariu, kiu vizitas multajn klubojn kaj ĉie prelegas. Eldona vendas razklingojn, informajn etikedojn, flagetojn kaj bildkartojn (apud libroj). Stellan Engholm ekeldonas *Malgranda revuo*, kiu aperos dum dek jaroj. Aperas «50 jarojn kun Paul Nylén (red. J. Strönne) kaj «Verda rapsodio» (red. F. Szilágyi kaj S.A. Jacobson).

**1943** La vojaĝsekretario havas plenan programon la tutan jaron. En junio SEF kongresas en Helsingborg. Same en junio okazas Somera Universitato, du tagojn en Lund, tri tagojn en Malmö; prelegas Collinder, Szilágyi, Nylén, Stenström, Strönne, Söderberg, Morariu, Ella Nilsson. Eldona 25-jara. Aperas «Dua rapsodio» de Szilágyi.

**1944** Morariu daŭrigas siajn vizitojn al la kluboj. Prelegoj de E. Pähn. En januaro konferenco en la Altlernejo de Stockholm: «La popoloj ĉirkaŭ la Balta maro. Pacproblemoj» kun Backlund, Collinder, Leijder, Turner, Vilkki. Jarmeze ĉesiĝas la laboro de la vojaĝsekretario, pro ekonomiaj kaŭzoj. Lingvopremio de la Pacasocio de Stockholm al P. Nylén. Aperas «Tria rapsodio» kaj «Humora novelaro» de Hasse Z.

**1945** Petskribo al la radio pri reenkonduko de regulaj radiodissendoj. *La Espero* al ĉiuj membroj; Ernfrid Malmgren prezidanto de SEF. Aperas «La fino», «La granda aventuro» kaj «Infanoj en Torento».

**1946** Komenciĝas amasa subskriba kampanjo al UN flanke de UEA. Rondveturado de Josef Vitek. *Somera Universitato* en Uddevalla. Prelegoj de Adamson, Beckman, Dahl, Malmgren, Noll, Setälä, Stenström, Støp-Bowitz, Strönne, Szilágyi, Söderberg. Dua dan-sveda esperanto-tago en Lyngby. Disaŭdigo laŭ la mallongaj ondoj de la radio. Oskar Svantesson nova redaktoro de *La Espero*. Sune W. Ahlm nova gvidanto de Eldona. Aperas «Mi serĉis oron kaj oleon», «Vivo vokas», «Kvara rapsodio», tria eldono de «La fino».

**1947** Prelegoj kaj kursoj dum tri monatoj de R. Dupuis en Skaraborg. Internacia junulara renkontiĝo en Norrköping. Koresponda kurso pri esperanto ĉe *Brevskolan*. IEL kaj UEA kunfandiĝas; SEF aliĝas. Ernfrid Malmgren prezidanto de la nova UEA. Tria dan-sveda esperanto-tago en Helsingborg. Aperas *Unua Informilo* de la UK 1948, kiu okazos en Malmö. Skolta sekcio de SEF fondita. La lingva premio de la Pacasocio de Stockholm al Harald Thilander. Aperas «Printempo de morto» kaj «Mary kaj Sulo».



*Ernfrid Malmgren – la unua prezidanto de nova UEA*

**1948** Prelegoj de Morariu, Anna Alamo kaj L. Brusewitz. Dan-sveda en Hilleröd. SEF kongresas en Stockholm: Jan Strönne prezidanto post Malmgren. Universala Kongreso en Malmö, kun Somera Universitato, radioelsendoj, ekskursoj, prelegoj, diservoj, k. a. Postkongresoj en Stockholm kaj Kopenhago. Eldona 30-jara; aperas «Enkonduko en la mondlingvon» kaj «Libro pri stenografio».

**1949** Prelegvojaĝo de egipto T. Megalli. Regulaj dissendoj ĉiun lundon de la Sveda Radio; gvidas Söderberg. Internacia kurso pri sveda socia strukturo kaj socia politiko en Viskadalen. Monkolektado pere de «Esperanto-Främjandet».

**1950** Prelegvojaĝoj de T. Megalli, I. Christensen, A. Alamo, T. Morariu, R. Dupuis. Granda ekspozicio en Gotenburgo en kunlaboro kun la poŝtmarkkolektantoj. Dan-sveda tago en Roskilde. Grupvojaĝo al UK Parizo: 386 gesvedoj. Dektaga kurso por neesperantistaj instruistoj en Uppsala; aranĝis Sveda Esperanto-Instituto kaj Skolöverstyrelsen. Aperas «Inter sudo kaj nordo», «Enketo pri internacia lingvo» kaj «Memorlisto de SEF».

**1951** Prelegoj de Patricia de Cleene kaj Elmar Calmus. Esperanto la unuan jaron ĉe la Skania Foiro en Malmö; io, kio fariĝis ĉiujara tradicio. Bengt Joelsson nova redaktoro de *La Espero*. Aperas «Ekspedicio Kon-Tiki».

**1952** Prelegoj de Pragano, Morariu kaj Alamo. «Florvojaĝo» al Nederlando aranĝita de ETK. Malmgren kaj Almén eksiĝas el la estraro. Internaciaj kursoj en Uddevalla. Antaŭkongreso en Gotenburgo (la UK estas en Oslo tiun jaron). La lingvopremio de la Pacasocio de Stockholm al Einar Adamson.

**1953** Prelegoj de Morariu, Szilágyi, Alamo kaj Sinha. SEF transdonas al Sveda Unesko-Konsilio detalajn informojn pri la instruado de esperanto kaj la nuna stato de la movado en Svedio. La peticio al Unesko transdonita en Parizo. Tiberio Morariu nova redaktoro de *La Espero*. Mortas Einar Adamson. Sveda Somera Semajno en Frostavallen. «Internacia kulturinterŝanĝo» estas la temo; prelegas Lapenna, J. Isbrucker, Söderberg, Strönne, Stenström. Dan-sveda tago en Ystad. Aperas «Normandaj rakontoj» kaj la informilo de SEF «För bättre internationell förståelse». Gazetkurso pri esperanto pretigita.

**1954** «Esperantoplaco» en Gotenburgo. SEF kongresas en Karlstad. Sveda Somera Semajno en Frostavallen; prelegas Lapenna, Pragano, Szilágyi, Sekelj. Einar Dahl elektita al la par-

lamento. Monkolekto por sendi reprezentanton al Unesko-konferenco en Montevideo. Aperas nova eldono de la esperanto-sveda vortaro de Nylén.

**1955** SEF kongresas en Malmö. Grupvojaĝo al UK Bologna; Malmgren daŭre prezidanto de UEA. La lingvopremio de la Pacasocio de Stockholm al Ivo Lapenna. Alvoko pri monkolekto por statuo sur la Esperantoplaco en Gotenburgo. Aperas «Sveda poemaro» de Magda Carlsson.

**1956** Dahl substrekas en la sveda parlamento la gravecon de la Unesko-rezolucio en Montevideo. SEF jubileas (50-jara) kaj donas la du unuajn orajn insignojn al siaj antaŭaj prezidantoj Paul Nylén (la plej longdaŭra) kaj Vald. Langlet (la unua). Postkongreso en Malmö (la UK estis en Kopenhago). Sveda Somera Semajno en Frostavallen kun Lapenna, Pragano, Støp-Bowitz, Waringhien pri «La ĉefaj obstakloj al internacia kompreniĝo kaj kooperado». Aperas «Vivu la stel'», nova kantlibro de SEF.




**1957** Kursoj kaj prelegoj de Major kaj Potts. SEF kongresas en Nybro. Esperantokurso en IBRA-radio. Ekaperas *Norda prismo*, redaktata de F. Szilágyi. Eldona translokiĝas al Malmö; Sven Sjöblom nova prezidanto. Aperas «Allas andra språk».

**1958** Prelegvojaĝoj de A. Starke kaj L. Kaufmann. Mortas Paul Nylén kaj Harald Thilander. SEF kongresas en Gotenburgo. Grupvojaĝo al UK en Mainz. Aperas «Lilla ordboken» de E. Vilborg, «Konstruteknika terminaro» de Moberg.

**1959** Prelegvojaĝoj de A. S. Brockie kaj Eizo Itoo. *EsperantoNytt* ekaperas; *Pressinformation* al la gazetaro startas. SEF kongresas en Lidköping «Honore al Zamenhof». Sveda Somera Semajno en Frostavallen kun Lapenna, Pragano, Sekelj, Itoo pri «Landoj — popoloj». Ytong fondas esperantoklubon por siaj dungitoj. La lingva premio de la Pacasocio de Stockholm al Anna Alamo-Sandgren. Aperas «Privilegia vojo» de V. Setälä.

**1960** Mortas Stellan Engholm. SEF kongresas en Falun; Björn Collinder elektita honora prezidanto de SEF. Junulara somermeza renkontiĝo en Skövde. Mortas Vald. Langlet. Aperas «Vägvisare till världsspråket».

**1961** SEF kongresas en Linköping. Granda ekspozicio en la ĉefa biblioteko de Malmö. Informa vespero en la Koncerta domo de Stockholm. Skribaĵo al la edukministro Edenman pri la internacia lingvo. Aperas «Malsata ŝtono» de R. Tagore, kiu inaŭguras la serion *Oriento-Okcidento*, kaj «Kredo, floroj, dinamito».

**1962** Prelegoj por instruistoj en Korsnäs kun Collinder, Söderberg, Setälä. SEF kongresas en Uppsala. Sven Alexandersson nova sekretario. Sveda Somera Semajno en Frostavallen kun Lapenna, Yagi, Pragano kaj Thierry. TEJO-kongreso en Ystad. SEF kolektas monon por «sveda ĉambro» en la Centra Oficejo de UEA en Rotterdam. Ebbe Vilborg fariĝas membro de la Akademio de Esperanto. La lingvopremio de la Pacasocio de Stockholm al Edmond Privat.

**1963** SEF kongresas en Lund. Sten Öfors transprenas la redaktoradon de *EsperantoNytt* post S. Alexandersson. Aperas «Svensk Esperanto-grammatik» de Carlén kaj «Ŝipestro rakontas» de F.T. Lundquist; la lasta ankaŭ en brajla skribo.

**1964** SEF kongresas en Örebro. Grupvojaĝo al la UK en Hago. La lingvopremio de la Pacasocio de Stockholm al T. Morariu. Aperas «Islandaj pravoĉoj» de B. Ragnarsson kaj «El la vivo de Zamenhof» de G. Henriksson.

**1965** Propono pri la internacia lingvo en la sveda parlamento. Subskribokampanjo al UN finita kaj ĉiuj listoj senditaj al UEA. Nordlanda Esperanto-Kongreso en Oslo. Aperas «Bona rido» de A. Helm, «Kredo al Dio en la atomepoko».

**1966** Prelegvojaĝoj de H. Sakaeda kaj Aŝvinikumar. SEF kongresas en Skövde; en Stockholm ĝi forlasas la ejojn ĉe Tegelbacken kaj 'ekloĝas' en la malnova urbo. Aperas «Jaroj sur tero» de L. Sinha kaj la 19-a eldono de la *Ŝlosilo*. Per tio tiu populara informilo atingas la eldonkvanton de entute 250 000 ekzempleroj.

**1967** Mortas F. Szilágyi. SEF kongresas en Norrköping. Eldona preparas eldonon de nova sveda-esperanta vortaro, verkota de Ebbe Vilborg. Sveda Instituto eldonas «Faktoj pri Svedujo».

**1968** SEF kongresas en Sundsvall. Grupvojaĝo al UK en Madrido. La Pacasocio de Stockholm donas la lingvopremion al Einar Dahl.

**1969** *Semajno de Internacia Amikeco* lanĉita laŭ ideo de E. Carlén. SEF kongresas en Gotenburgo. TEJO-kongreso en Tyresö (la 25-a). H. Tonkin elektita prezidanto de TEJO. Manifestacio en la centro de Stockholm.

**1970** Mortas E. Malmgren. Åke Blomberg nova redaktoro de *La Espero*. SEF kongresas en Jönköping. Grupvojaĝo al la UK en Vieno. Ĉiun jaron okazas dan-sveda esperantotago; ĉijare en Gladsaxe. Aperas «Tra lando de indianoj» de T. Sekelj.

**1971** SEF kongresas en Stockholm kaj ekskursas al Drottningholm. Grupvojaĝo al UK en Londono. La dan-sveda tago okazas en Malmö. La lingvopremio de la Pacasocio de Stockholm iras al Andreo Cseh.

**1972** SEF kongresas en Västerås, kie gastprelegas Ib Schleicher pri «Efika informado». Sveda Somera Semajno en Frostavallen kun Lapenna, Bormann, Wells, Thierry, Söderberg. Ekaperas *Klubbinfo* kaj *Klippinfo*.

**1973** Prelegvojaĝoj de J. Guillaume, A. Ciccanti kaj J. Minani. Granda ekspozicio en Västerås. SEF kongresas en Kalmar kaj rigardas la novan ponton. Semajnfina kurso por kursgvidantoj en Lund; dan-sveda tago sur la insulo Ven. SEF ekloĝas en sia nuna ejo ĉe Hägervägen 31 en Enskede. Grupo Esperantista de Stockholm fariĝas 75-jara.

**1974** SEF kongresas en Borlänge. Monkolekto por eldono de nova sveda esperanto-vortaro lanĉita. Ĝi atingos pli ol 80 000 kronoj. Semajnfina kurso en Kramfors. La lingvopremio de la Pacasocio de Stockholm al Jan Strönne. Aperas «Ek! — Meminstrua lernolibro pri esperanto» de H. Behrmann.

**1975** Justin Minani prelegvojaĝas en lernejoj; organizas Lennart Åberg. Semajnfina kurso en Malmö. Å Blomberg nova prezidanto de Eldona. SEF kongresas en Halmstad. Postkongreso en Gotenburgo (la UK estas en Kopenhago). SEF donacas 1000 kronojn al ĉiu nova klubo. *Esperantonytt* aperas en speciala numero: 52 mil ekzempleroj. Einar Dahl elektita honora membro de UEA. Aperas «Suplemento al la sved-esperanta vortaro» de E. Vilborg.

**1976** Plia prelegvojaĝo de Justin Minani. SEF kongresas en Skellefteå samtempe kun la IFEF-kongreso. SAT kongresas en Gotenburgo. Eldona kaj SEF aĉetas fotokompostilon; *La Espero* nun kompostata en la oficejo de SEF. Semajnfina kurso en Västerås. UEA donas *Trofeon Fyne* al SEF kiel plej aktiva asocio. SEF opinias la klubon de Västerås la plej aktiva en la lando kaj pludonas la trofeon al ĝi.




**1977** *La Espero* plioftiĝas: ok numeroj po jaro; nova redaktoro fariĝas Franko Luin. SEF kongresas en Falköping. Semajnfina kurso en Kungälv. En la aŭtuno speciala numero de *Esperantonytt* en 55 000 ekzempleroj. Publika diskuto pri esperanto en Örebro. *Klubo Cent*, nova formo de ekonomia subteno al SEF, estas lanĉita. Erik Carlén estas elektita honora membro de UEA.

**1978** Prelegvojaĝo de A. Ciccanti. Plimultiĝas la semajnfinaj kursoj: pri interpretado en Stockholm, pri kursgvidado en Jönköping, pri helpo al kluboj en Helsingborg. Renkontiĝo kun parlamentanoj en la sveda parlamento. Traduka konkurso aranĝita la unuan fojon. SEF kongresas en Uppsala kun interesa podia diskuto. Nova prezidanto fariĝas Roland Lindblom. Decido pri Universala Kongreso en Stockholm en 1980.

**1979** Mortas Einar Dahl. SEF kongresas en Kungälv; Jan Strönne forlasas la estraron. Semajnfina kurso por kursgvidantoj en Karlskoga. Dum la tuta jaro ekspoziciado de infandesegnaĵoj en Gotenburgo, kunlabore kun diversaj asocioj; organizanto Lennart Åberg. La lingvopremio de la Pacasocio de Stockholm al Sven Alexandersson. Aperas en esperanta traduko «Aniaro» de Harry Martinson.